



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 223

Novembro, 2004

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas ankoraŭ \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆ ☆

LA REALA DIALOGO

Mi estas kaj parlamentano en la provinca parlamento de Nov-Skotio kaj esperanta progresanto. Kial, vi povas demandi vin, parlamentano interesiĝas pri la esperanta? Permesu al mi rakonti mian historieton.

Kun la subteno de la Nacia Demokrata Instituto (NDI), usona neregistara organizaĵo, mi vojaĝis al Bosnio (2003 aŭtune), al Kosovo (2001 vintre) kaj al Montenegro (2001 somere). Ĉiuj el tiuj landoj estis partoj de la eksa Jugoslavio. Ĉiuj estas junaj demokratioj. Kaj ĉiuj travivis, antaŭnelonge, civilan militon.

La celo de miaj vojaĝoj estas interparoli kun la parlamentanoj de ĉi tiuj landoj pri nia kanada demokratio, niaj elektoj kaj kiel ni klopodas bone reprezenti tiujn, kiuj voĉdonis por ni. Kompreneble, interparoli kun homoj de aliaj landoj devigas, ke mi zorgeme pensas pri la kanadaj politikaj sistemoj kaj metodoj, fortecoj kaj malfortejoj. Ĉi tiu zorgema pensado, kaj la ebleco kompari miajn travivaĵojn kun la travivaĵoj de aliaj, helpas min iĝi pli bona parlamentano.

Estis ja dum ĉi tiuj vojaĝoj, ke ekkomenciĝis mia intereso pri Esperanto. Sed ne estis ĉar bosniano parolis al mi esperante, aŭ ĉar mi vidis aŭ aŭskultis iam en Kosovo la esperantan lingvon. Miaj vojaĝoj donis al mi du motivojn por esplori la internacian lingvon.

Unue, mi eksciis ke neniam mi povos lerni la albanan, la serban aŭ la kroatan, krom facilaj frazoj kiel „bonan matenon” aŭ „multan dankon” aŭ „alportu du bierojn, mi petas”. Ĉi tiuj lingvoj estas malfacilaj, kun multaj subtilaĵoj. La serba, ekzemple, havas sep kazojn. Kompreneble, mi havas la avantaĝon de interpretistoj dum niaj kongresetoj; sed uzi interpretistojn estas formala, kaj malutila por konversacioj neatenditaj aŭ spontanaj.

Due, mi eksciis ke la lingvaj bariloj estis parto (sed nur parto) de la problemoj de ĉi tiuj landoj. La diferencoj inter la serba, la bosnia kaj la kroata estas tre malgrandaj kompare al tio, kion ili havas komune. Iuj diras ke, fakte, ili estas samlingvaj; sub la jugoslava registaro de Tito, la lingvo nomiĝis „la serba-kroata”. Tamen, hodiaŭ en ĉi tiuj landoj, la nomo mem de la lingvo estas tre polemika. Por eviti polemikon, ni, la eksterlandanoj, preferas nomi ĝin „la loka lingvo”. Imagu la aliajn lingvajn polemikojn, kiuj povas rezulti, se oni ne povas eĉ konsenti pri la nomo de la lingvo.

Bosniano rakontis al mi ŝercon, kiu ilustras la problemon. (Por kompreni la ŝercon, vi devas scii ke la serba, la kroata kaj la bosnia havas similajn, sed neidentajn, vortojn por „kafo”; ke oni ne povas, nur laŭaspekte, distingi la serbojn, la kroatojn kaj la bosnianojn; kaj ke, dum la milito, elekti vorton aŭ frazon de la „malĝusta” lingvo povus esti danĝera, eĉ mortiga.) Jen la ŝerco:

Post la milito, bosniano iras al kroata urbeto, kaj eniras kafejon. Li petas „kafon” (la bosnia vorto). La proprietulo, senridete, diras „Ni ne havas ‘kafon’ ĉi tie.” La bosniano, ekŝvitante, pardonpetas, kaj petas „kavan” (la kroata vorto). La proprietulo, ankoraŭ senridete, diras „Ni ne havas ‘kavan’ ĉi tie.” La bosniano, nun ektimante, kaj pensante ke la proprietulo devas esti serba, pardonpetegas denove kaj petas „kafaon” (la serba vorto). La proprietulo diras „Ni ne havas ‚kafaon’ ĉi tie ... nia maŝino ne funkcias!”

Mi tute ne volas diri, ke mi revas ke la homoj de ĉi tiuj landoj forlasos siajn lingvojn. Nepre ne. Iliaj mirindaj lingvoj estas riĉaj de historio kaj kulturo. Mi volas diri, pli ĝuste, ke mi vidas eblecon ke ĉi tiuj homoj, kaj ni la eksterlandanoj kiuj vojaĝas por kunlabori kun ili, povos trovi neŭtralan kaj fruktan teron kun internacia lingvo kiel la esperanta.

Do, nun mi estas esperanta progresanto. Mi povas legi esperante plimalpli bone, skribi esperante iom malpli bone, kaj aŭskulti kaj paroli esperante ankoraŭ malpli bone. Sed la plej grava fakto estas ke mi volas plibonigi mian esperantan kompetentecon, kaj uzi ĝin por amikiĝi kun samideanoj de aliaj landoj.

Tiam, kaj nur tiam, la reala dialogo povos komenciĝi.

— Graham Steele

<http://www.grahamsteele.ca/esperanto.html>

KONGRESUMI SIGNIFAS...

UK (Universala Kongreso) ĉiam estas granda evento, renkontiĝo de centoj (kelkfoje miloj) da esperantistoj el ĉ. 50-60 landoj. La ĉi-jaran kongreson (en Pekino) partoprenis iom pli ol 2000 homoj el kiuj ĉ. 1000 devenis el Ĉinio. Dumkongrese kunvenas ne nur la „simplaj esperantistoj” sed oni povas renkontiĝi, ofte eĉ paroli, kun la eminentuloj, estroj de la movado (ekz. H. Tonkin, R. Corsetti...), kun famaj verkistoj (S. Stimec, P. Gubbins...), aktoroj, lingvistoj aŭ simple kun novaj kaj malnovaj kongresaj amikoj. Oni havas dum unu tuta semajno multajn interesajn programerojn, eventojn, kursojn kaj ekskursojn, longegajn laborkunsidojn, ktp. La oficiala programo troviĝas en la tiel nomata **Kongresa Libro**, kiu enhavas ankaŭ la liston kaj adreson de ĉiu partoprenanto, listigitaj kaj laŭlande kaj laŭ la vicordo de la aliĝoj. La kongresa numero estas grava identigilo. Por ŝpari tempon kaj esti preciza, oni notas la numeron de la parolpartnero, kaj poste estas facile trovi la personon en la listo. (Mia numero estis 807). La plejmulto de la partoprenantoj de kongresoj - se ili ne krokodilas - dum la semajno havas la okazon pli-malpli tiom multe paroli (kaj aŭskulti) en Esperanto kiom ili faras dum la tuta jaro. Komunikante kun diversnaciaj homoj, oni spertas evoluon kaj en la komprenkapablo kaj en la parolkapablo. La legokapablon oni evoluigu per la libroj kiuj amase aĉeteblas en la libroservo, sed minimume oni legu la kongresan kurieron, kiu raportas pri la ĉiutagaĵoj. Kaj la skriba? Ties tempo venos post la kongreso kiam oni skribas de la hejmo dekojn da poŝtkartoj aŭ retmesaĝoj al la amikoj, kiujn oni renkontis. Paralele kun la granda, okazas ankaŭ infan-kongreso - ofte en alia urbo (por ke la gepatroj estu tutliberaj dum la semajno), sed ĉi-foje la programoj okazis ene de la granda kongresejo kaj la tuto funkciis nur dumtage, kiel infanzorgejo. Tiel ni ofte povis vidi (kaj aŭdi!!!) la infanojn. Inter la ĉinaj infanoj mi rimarkis tri francajn, kiuj formis apartan komunumon kaj bone ludis en sia lingvo, je la malĝojo de siaj gepatroj kiuj volis, ke ili parolu Esperanton. Dum aliaj kongresoj spertaj esperantistoj (lastatempe Stefan MacGill) zorgis pri altnivelaj kaj amuzaj programoj kaj gvidis bonegajn infankongresetojn, kie oni klopodis malhelpi la krokodiladon. Tia aranĝo puŝis siatempe ankaŭ Petra-n por vere lerni Esperanton. Kiam H. Tonkin rakontis al ni dum NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro en Vermonto, Usono), ke li partoprenis pli ol 40 kongresojn (mi ne memoras la nombron), mi pensis ke li estas unikaĵo en la movado. Sed tute ne; ni renkontis geedzan paron, kiu same ĉeestis jam pli ol 40 kongresojn, kaj kongresumado estas jam nehavebla parto de ilia vivo, somera programo, kaj certe ankaŭ de la jara familia buĝeto. Por mi tiu ĉina kongreso estis nur la 7-a. Vidu la vicon: Vieno (1992), Valencio (1993), Prago (1996), Adelajdo (1997), Montpeliero (1998), Berlino (1999) kaj la nuna, la 89a kongreso en Pekino (Bejĝing). Por via agendo

kaj buĝeto mi skribu, ke la sekvaj okazos en Vilno (Litovio-2005), Florenco (Italio-2006) kaj Jokohamo (Japanio-2007).

La kongresejo troviĝis en la eksa olimpika centro de Pekino, ankaŭ la hoteloj kie la partoprenantoj plejparte loĝis. En tiu parto de la urbo altas ĉielskrapuloj, modernaj, altaj domoj, serpentumas larĝaj avenuoj, sur kiuj – kiel formikoj – vicumas miloj da aŭtoj kaj veturiloj. Vi povas trovi kaj la plej modernajn kaj malnovajn, ŝajne memfabrikitajn aŭtojn kaj motorciklojn, kaj milojn da bicikloj. Laŭlonge de la ŝoseoj kaj avenuoj - almenaŭ en nia distrikto - sur la lanterno-kolonoj pendis ruĝaj afiŝoj, kiuj salutis la 89an Esperanto-kongreson. Estis imprese. Kiom da ĉinoj rimarkis tion? Kiom el inter ili ekinteresiĝis pri Esperanto? Mi ne scias. Sed fakte tiu facila komuna lingvo tute bonvenus por ili. Ja la nivelo de la angla, kie ajn ni provis interkompreniĝi, estis mizerega kaj la rezulto plej ofte nenia. Eĉ en 4-5-stelaj hoteloj, ĉe la akceptejo ĝenerale nur unu persono „parolas” la anglan, kaj ankaŭ ties vortprovizo konsistas nur el antaŭe lernitaj bazaj frazoj. Do, Dio savu vin se vi demandu ion alian ol tio, kion oni povas ĝenerale demandi. Kaj laŭeble uzu la samajn vortojn, en la sama vicordo, kiel aperas en ilia lernolibro. Alimaniere vi devas uzi gestojn, desegnaĵojn, aŭ simple kapjese rideti kaj atendi, fidante ke la bona sorto helpos vin. La plej grandaj kaj gravaj surprizoj povas trafi vin en la restoracioj.

La vetero en tiu ĉi somero ne tre favoris min, kaj en Vermonto kaj en Ĉinio, kaj poste ankaŭ en Francio; Bretonio estis multe pli pluvema ol ĝenerale en tiuj lokoj oni antaŭvidus. Tiel mi konkludis, ke ne la lokoj kulpis, sed eble mi altiris la humidaĵojn de la ĉielo ... aŭ Dio simple ne volis dolorigi mian koron kaj ne sendas „veteron de ferioj” kun suno, varmo, ktp... por ke mi ne tro suferu pro la labordevoj. Ankaŭ en Ĉinio ofte pluvis kaj ni ĝojis ke nia hotelo estis ligita kun la kongresejo pere de longa interna koridoro. Ties vitrofenestro estis tiom dika kaj tiom griza, ke mi nur post la tria tago rimarkis, ke ŝajnas plui kaj la ĉielo griziĝas eĉ se estis ekstere sunlumo. Do, ni decidis neniam kredi nur al la okuloj, sed ĉion kontroli ankaŭ per aliaj sensiloj ... kaj tiel ni kelkfoje tamen sukcesis vidi la sunon, sperti varmon.

Ĝenerale mi partoprenas kongreson por labori tie, instrui kaj ekzameni. Sed kelkfoje restas tempo ankaŭ por aliaj aferoj. En Pekino ni partoprenis la bankedon kaj iom ankaŭ la postan balon, kelkajn prelegojn, aŭkcion – kie Humphrey provis vendi malnovajn objektojn kaj librojn en amuza stilo – artan vesperon, tuttagan ekskurson, kelkajn prelegojn kaj fakajn kunvenojn kaj dekojn da personaj kaj amikaj renkontiĝoj. En la cetero de la tempo mi aŭ gvidis lecionojn, estris ekzamenojn, prelegis aŭ gvidis laborgrupojn.